# BOLETIN

## DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

AÑO VIII N.° 11 (95) NOVIEMBRE, 1956

## LA U. N. E. S. C. O. Y NOSOTROS

Cúmplese, en estos días, el décimo aniversario de la fundación de U. N. E. S. C. O., el organismo superestatal que tiene la misión de extender, por todo el mundo, los beneficios de la civilización, en provecho de la paz mundial.

Y, en breve, se cumplirá el segundo aniversario del reconocimiento, por la U. N. E. S. C. O., de la misión cultural y pacífica del Esperanto, cuyo paralelismo de objetivos con los suyos propios augura, para el porvenir, una provechosa y fructífera colaboración.

Universala Esperanto-Asocio, en cumplimiento de los acuerdos tomados en Montevideo, envía, a Nueva Delhi, a un observador capacitado —Tibor Sekelj—, quien, sin duda alguna, seguirá cosechando para la causa del Esperanto, la mies que, en venturosos días, inició el Profesor Ivo Lapenna, entusiásticamente secundado por destacados esperantistas uruguayos.

No dudamos del éxito de la reunión de U. N. E. S. C. O. en provecho de la cultura. No ignoramos la capacidad y buena voluntad de los científicos, pedagogos y diplomáticos de los países que a ella acuden, y a la que España envía a sus mejores especialistas. Esperamos que, en su labor, no dejarán de considerar cuán grande es el anacronismo entre el progreso cultural y la cada vez más enmarañada madeja idiomática, que dificulta y a veces paraliza la buena marcha de la difusión cultural y el entendimiento entre los pueblos.

Grandes son las necesidades espirituales de estos, y el atraso material de algunos de ellos es apenas comparable con su vaciedad cultural. Grande es, por consiguiente, la tarea a cumplir por la U. N. E. S. C. O., en ese sentido. Pero, somos muchos centenares de miles de personas, en

# HISPANA KRONIKO

*MANRESA.* Kiel ĉiŭjare, la Esperanto-Fako de la poliglota societo «Lingua Club», dum la dua semajno de oktobro malfermis elementan kurson en sia ejo, post propagandi per afiŝoj kaj la lokaj radiostacio kaj periodaĵo, la celojn de Esperanto kaj la baldaŭajn kontentigajn rezultatojn, kiujn ĉiu komencanto povos atingi. Futbalmaĉo inter du esperantistaj teamoj, kiu altiris la atenton de la sportamantoj, estis alia efika reklamo por la inaŭgurota kurso. S-ano J. de la Cruz, kiel kutime ĝin gvidas.

El la grava industria urbeto San Vicente de Castellet alvenis al nia klubo insista peto por ke ni ebligu starigon de kurso tie, ĉar la propagando kiun ni faris, disvastiĝis ĝis la najbaraj vilaĝoj. Neniam okazis en la citita urbeto Esperanto-instruado, kaj pro la bela perspektivo povi esti iam, kiel eble plej baldaŭ, kreita la unua klubo, ni akceptis la sugeston. La 21-an de oktobro en la kunsidsalono de la urbodomo, antaŭ sciavida ĉeestantaro, la prezidanto de la Esperanto-Fako de «Lingua Club» S-ano Mora, prelegis pri la plej aktualaj kaj fundamentaj trajtoj de la Zamenhofa kreaĵo, por finprepari la grundon. La kurso kun tridek-kvin gelernantoj disvolviĝas sub gvidado de S-ano M. Sabriá.

La vigla folklor-dancista societo «Agrupación Manresana de Folklore», intencas allasi Esperantokurson en siajn fakulajn studrondojn pere de la helpo de «Lingua Club», por tiel havi ŝancon interrilatiĝi ĉefe pri folkloraj dancoj kun la tuta mondo. Espereble la kurso ekfuncios baldaŭ.—*M.*

*BURJASOT.* La 20-an de pasinta Septembro, la Esperanto-Rondeto de la Agrupación Musical «Los Silos» ricevis la viziton de la Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, D-ro Herrero. S-ano Albero prezentis al D-ro Herrero la Prezidanton de la Agrupación Musical «Los Silos», S-ron Montoliu; la Vicsekretarion, S-ron Girós, kaj la Kasiston, S-ron Suay, kiuj vidas simpatie kaj plaĉe Esperanton kaj la laboron de nia Esperanto-Rondeto. D-ro Herrero gratulis kaj dankis ilin. Ankaŭ ĉeestis samideanoj: S-ro Carmelo Miquel, advokato; S-ro Henriko Diago, profesoro en metiista lernejo kaj la veterano S-ro Jozefo Domingo, malnova kaj tre fervora esperantisto. Ĉiuj sidis antaŭ D-ro Herrero kaj kun plej granda atento aŭskultis lian agrablan kaj plaĉan paroladon, kiu temis pri la ĉefaj flankaspektoj de la kongresoj de Zaragozo kaj Barcelono. La vizito de D-ro Herrero tiom entuziasmigis la ĉeestantojn, ĉefe la junulojn, ke la 3-an de Oktobro oni malfermis kurson por komencantoj. Jen do feliĉa kaj efika vizito. Al D-ro Herrero, kiel prezidanto de H. E. F. kaj kiel esperantisto, ni esprimas niajn dankosentojn pro lia helpo al ĉi tiu Esperanto-Rondeto, hodiaŭ malgranda, sed kun deziroj pligrandiĝi, kaj ke li revenu venontan jaron.—*R. A.*

*VALENCIA.* Fondiĝis la Esperanto-Grupo de la Sindikata Organizaĵo «Educación y Descanso». Inter la grupanoj ekzistas granda entuziasmo kaj multaj projektoj rilate al Esperanto kaj aliaj aferoj: kursoj, konkursoj, vojaĝoj, sportoj ktp. Estas rimarkinde, ke

**al la paĝo 345**

---

todo el mundo, con plena conciencia, por conocer a fondo el problema, de que una de las más acuciantes necesidades culturales del mundo es la intercomprensión idiomática, sin la cual toda otra labor está condenada a la esterilidad. De ahí que uno de los deberes más elementales de los delegados de todo el mundo es lograr que todos, en él, puedan comprenderse, gracias al Esperanto.

Para ello, como para toda otra actividad cultural, Universala Esperanto-Asocio colaborará, siempre, entusiásticamente, con U. N. E. S. C. O., a cuya reunión actual, en Nueva Delhi, llegará el aliento moral y el saludo efectivo de los esperantistas españoles.

# RAPORTO PRI LA INTERNACIA KONGRESO DE «VIVANTA LATINO»

Tiu Kongreso okazis en Avignon (Francujo), de la 2-a ĝis la 6-a de Septembro 1956.

Kiam Profesoro Lapenna skribis al mi dum Junio, por peti de mi ĉeeston ĉe la Internacia Kongreso pri «*Vivanta Latino*», mi akceptis, malgraŭ mia firma opinio ke mi perdos tempon kaj monon.

Sed tamen, mi pripensis la aferon, kaj alvenis al la konkludo ke ni devas esti tre atentaj pri tiaj kongresoj.

Do, mi aliĝis, kun mia filino Colette, anino de U. E. A., studentino ĉe la Fakultato de Montpellier, kaj petis U. E. F. sendi 150 diversajn literaturajn librojn al nia Delegito en Avignon, Samideano Motto, por organizo de Ekspozicio.

La Ĝenerala Sekretario de U. E. F., Samideano Ribot, venis kun sia edzino, kaj deĵoris plensukcese ĉe la Ekspozicio.

La unuan kunsidon de tiu Internacia Kongreso ĉeestis 160 partoprenantoj el 22 landoj; montriĝis ke la organizintoj de tiu Kongreso estas S-ro Edouard Théodore-Aubanel, eldonisto en Avignon kaj S-ro Jean Capelle, Eks-Rektoro de la Universitato en Nancy, ĝenerala Direktoro de edukado en Okcidenta Afriko.

La unua raportinto estis Profesoro Jean Bayet, Direktoro de la Franca Lernejo en Romo. Temis pri la latina gramatiko. Li agnoskas ke gramatiko kaj sintakso ne estas facilaj, kaj li diras ke la plej grava manko estas la artikolo! Li dezirus simpligon, sed, kiel fervora latinisto, li ne volas ke oni stumpigas la lingvon! — Vera problemo sen solvo!

Dum tri tagoj, oni aŭdis multajn raportojn, sed fakte, oni alvenas al la konkludo ke simpligon de la gramatiko la kongresistoj ne deziras, sed nur novan pedagogion kaj kelkajn konsilojn pri prononcado.

Mi parolis kun diversaj fakultataj profesoroj. Ili diris al mi: «Estas tute absurde pensi pri latino kiel internacia lingvo por ĉiuj! Latino restos la lingvo de la kulturo nur por elito!»

Vizitante nian Esperantan Ekspozicion, tiuj profesoroj aĉetis lernolibrojn, sed fakte, ili estis absolute mirigitaj pri la riĉeco de nia literaturo.

Post la legado de la raportoj, france aŭ latine, okazis diskutoj, sed neniam per latina lingvo, sed nur france, germane aŭ itale!!!

Ĉe la festeno (luksa) oni aranĝis tiamaniere ke ĉiuj samlandanoj estu kune, por bona interkompreniĝo!

La organiza komitato ne akceptinte raportojn pri Esperanto aŭ pri projektoj de internaciaj lingvoj, nia Samideanino Fraŭlino Bonnafous, Agregacia Profesorino pri Latina Lingvo en Liceo de Avignon, provis paroli pri Esperanto ĉe la ferma kunsido, sed okazis tiom da bruoj kaj krioj, vere indignaj de Asembleo de Rektoroj kaj Profesoroj, ke ŝi ne povis esti aŭdata.

Feliĉe, la Ekspozicio de «U. E. F.» ludis sian rolon, kaj la gazetaro favore raportis.

La venonta Kongreso pri «*Vivanta Latino*» okazos en 1958 en Bruxelles. Ni invitos la Kongresistojn, ne nur por viziti esperantan Ekspozicion, sed ankaŭ por aŭdi prelegon, ĉar, fakte, montriĝis ke multaj gravaj intelektuloj ne havas scivoleman menson kaj tute ne konas nian aferon.

*René Llech - Walter*
**(El «Franca Esperantisto»)**

---

# UNA VALIOSA OPINIÓN

En nuestro número de Mayo hicimos saber a nuestros lectores que el glorioso General Moscardó, recientemente fallecido, era un convencido de la necesidad e importancia del Esperanto. Hoy, debidamente autorizados, copiamos los términos de la carta que, en 5 de Julio de 1951, dirigió al esperantista barcelonés don R. Rocamora.

«Hasta conocer las actividades y entusiasmo que usted ha puesto en la difusión del Esperanto, no he logrado apreciar lo muy beneficioso que sería para la Humanidad esa perfecta comunicación espiritual, proporcionada por un lenguaje común, pero, sin olvidar nunca el idioma patrio, que nos enseñó nuestra madre, y con el que aprendimos a rezar».

Nos complacemos en presentar tan valiosa opinión, que demuestra, una vez más, que se puede ser amante de la Patria y, al propio tiempo, decidido partidario de la comprensión internacional.

# MALNOVAJ KLOPODOJ DE LA HISPANOJ, POR INTERNACIA LINGVO

La relativa rapideco kun kiu Esperanto atingis nian landon kontrastas kun tiuj aliaj utilaj progresoj, kiuj bezonis dekojn da jaroj por definitive venki en Hispanio. Diversaj estis la kaŭzoj, kiuj tion ebligis. De antaŭ multaj jaroj la hispanoj sentis la bezonon pri internacia interkomprenilo. Kiam Volapük alvenis al ni, ĝi havis multajn adeptojn, eĉ fervorajn. Ili akceptis la unuan reformon de la lingvo, sed kiam okazis la definitiva, kiu ŝanĝis la tutan fizionomion donitan de la aŭtoro, ili komprenis ke Volapük ne estis taŭga por internaciaj rilatoj, kaj tiu lingvo falis ĝis malapero. Tamen en la menso de tiuj progresemuloj la ideo de internacia interkomprenilo estis tre forta. Diversfoje iuj personoj demandis al mi ĉu la hispanoj kontribuis iamaniere al la starigo de internacia lingvo. Mi devis respondi jese.

Reliefaj personoj dum mezo de la pasinta jarcento sentis tian neceson; inter tiuj personoj estis la fama Balmes. Dum la jaro 1851 aperis projekto pri universala lingvo, kies aŭtoro, Pastro Bonifacio Sotos Ochando, bone studis kaj planis la projekton. Estas stranga komparo, sed en tiu epoko (1855) la tiama hispana Parlamento voĉdonis oficialan helpon al la projekto, kaj nuntempe Esperanto tute ne ricevas oficialan helpon. Por bone helpi la disvastigon de la projekto, la aŭtoro entuziasmigis la faman doktoron, universitatan rektoron, S-ron Pedro Mata, kaj ĉi tiu konsentis labori pri ĝia disvastigo. Doktoro Mata prelegis dekdu fojojn, kaj en tiuj prelegoj li majstre prezentis kaj analizis la diversajn hispanajn studojn, kiuj ekzistis antaŭ la apero de tiu de S-ro Sotos Ochando. Tiuj ideoj pri internacia lingvo, pli malpli interesaj, estis multaj, sed pli perfekta kaj efika estis ĉi tiu menciita. Laŭ la gramatiko, la artikolo estis *il*. La konjugacio estis ne tre facila, sed jam oni sentis la neceson, simpligi la verbajn tempojn. Tiuj interesaj paroladoj estis kompilitaj en volumo, kiu estis presita en Madrido, en la jaro 1862, sub la titolo *Curso de Lengua Internacional.*

Antaŭ la demando, ĉu ĉi tiu lingvo influis en aliaj projektoj kun internacia senco, mia opinio estas jesa. Tial ke la aŭtoro jam montris la vojon por perfektigi la gramatikon, estas klara afero ke S-ro Schleyer (*), aŭtoro de Volapük, eltiris profiton el la ideo, ĉar la hispana projekto aperis antaŭ ol Volapük, kiu vidis la publikan lumon en la jaro 1880. En la jaro 1855, en la hispana Parlamento (Constituyentes de 1855), komisiono prezidita de S-ro Ríos Rosas proponis monan helpon al la projekto de S-ro Sotos Ochando, kaj la Parlamento akceptis. Per tiu subvencio la aŭtoro iris al Parizo por perfektigi la lingvon. Ĝi estis prezentita al la Lingva Societo, kie oni tre bone akceptis kaj laŭdis ĝin, aperigante la francan eldonon de la lingvo (Paris 1855). Pastro Sotos Ochando revenis al Hispanio, kaj en Madrido li fondis societon kiu eldonis bultenon. Pri tiu lingva projekto ekzistas libroj kun jenaj titoloj: *Proyecto y ensayo de una lengua universal y filosófica* (Madrid 1851, 1859, 1862), *Gramática de la lengua universal* (1863) kaj *Cartilla de la lengua universal* (1865).

Tia projekto certe estis interesa kaj utila, ĉar D-ro Pedro Mata entuziasme akceptis la ideon, kaj kun lia granda influo kaj talento, fervore propagandis la universalan lingvon. D-ro Mata en tiu epoko estis altranga scienculo. Ankaŭ Pastro Sotos Ochando, kiu mortis en la jaro 1869, havis grandan influon, kaj en Parizo li estis edukanto de princoj.

La logika bilanco de ĉi tiu artikolo, estas ke la projekto aperis en Hispanio tridek jarojn antaŭ ol Volapük kaj Esperanto, kaj kun ĝia apero la hispanoj kontribuis al la starigo de internacia lingvo.

*José Lerroux*, Barcelono.

(*) Johano Schleyer mortis en 1911. Dum la 7-a Esperanto-Kongreso en Antwerpen (21 Aŭgusto 1911) D-ro Zamenhof tre simpatie parolis pri la maljuna Prelato Schleyer, nomante lin «la patro de la internacilingva movado».

**CURSOS DE ESPERANTO POR CORRESPONDENCIA**

Centro autorizado por el
Ministerio de Educación Nacional, Núm. 68

Forn, 19 ⁘ MOYÁ (Barcelona)

# KIAJ ESTAS LA TASKOJ DE KONGRESO

Ni represas, el la bulteno de la Societo por Internacia Lingvo, kiun tiel lerte redaktas D-ro Bormann, la jenan interesan parton:

«Reveninte el Kopenhago, kie ni travivis la bonajn kaj belajn, streĉajn, tamen kuraĝigajn aranĝojn de la Universala Kongreso de Esperauto, ni ŝatas iom mediti pri tio, kion ni spertis. Vi certe legis la raportojn en la revuoj, do ni ne bezonas ripeti informojn, sed ni volas trakti la aferon el niaj vidpunktoj kaj nur tuŝi kelkajn principajn detalojn kongrespolitikajn, kiuj povas esti precipe interesaj, kaj eble tiri certajn konkludojn. Ni demandu kaj respondu:

*1* *Kiaj estas la taskoj de Kongreso?*
Estas jenaj:

11 manifesti la vivantan Esperanton

111 per reprezentaj aranĝoj,

112 per prezentado de altnivela aplikado kaj ĉiutaga uzado de la Internacia Lingvo,

12 plibonigi kaj progresigi la komunumon de la esperantistoj,

13 plenumi specialajn funkciojn laŭstatutajn.

*2* *Kiuj estas la kaŭzoj, intencoj, deziroj, pro kiuj la esperantistoj partoprenas?*
Estas jenaj:

21 La ĉeestantoj taksas la partoprenadon sia devo por kontribui al sukceso de la kongreso,

22 la ĉeestantoj volas informiĝi pri la plej nova stato de la movado kaj entuziasmiĝi en la granda internacia samideana komunumo por hejmeniri kun nova kuraĝo al plua laborado,

23 la ĉeestantoj ŝatas renkonti malnovajn konatojn kaj amikojn aŭ viziti la kongreslandon pro turismaj interesoj kaj plezuroj.

Ne ĉiuj, kompreneble, havas la samajn emojn. Kiel malsamaj estas la homoj, la esperantistoj, tiel malsamaj estas iliaj pensadoj, pro kaj kun kiuj ili venas. Parto el ili venas nur pro tute speciala kaŭzo, parto venas pro pluraj kaŭzoj.

*3* *Kiel la subjektivaj intencoj de la partoprenantoj konformas al la objektivaj taskoj de la kongreso?*
Estas jene:

31 Ĉiuj ĉeestantoj kontribuas al la plenumo de la tasko citita sub 11, eĉ se en malsama grado, al la manifestado de vivanta Esperanto.

32 Nur parto el ili interesiĝas aŭ kapablas efike kontribui al la (sub 12 citita) evoluigo, la plivastigo kaj pliperfektigo de la komunumo entuta aŭ de ties branĉoj.

33 Eĉ pli malgranda estas la parto de ĉeestantoj, kiuj plenumas la (sub 13 cititajn) specialajn funkciojn laŭstatutajn. Ni ne volas mencii ke ĉiuj ĉeestantoj ja plenumas laŭstatutan taskon per tio ke ili partoprenas la voĉdonadon en la ĝenerala kunveno. Kiel ajn grava tio estu, ne estas speciala aktivado. Sed la agado de la funkciuloj estas —kiel ni spertis— vere streĉa, plezurraba,

tamen respondeca farado kiu laŭnature nur povas okazi en proporcie plej malgrandaj rondoj.

4 *Kiujn konkludojn ni tiru el la spertoj?*

El niaj vidpunktoj la jenajn:

41 Unue ni konstatu ke la kongreso 1956 vere bone funkciis dank' al la lerta organizado kaj la fervoro de ĉiuj kiuj neniam laciĝante deĵoris, organizis, estris, prelegis, aŭ iel ajn aktivadis. Tial ni ne trovis ion gravan kritikinda.

42 Ni nur donu kelkajn instigojn kiuj ŝajnas al ni pripensindaj kaj diskutindaj:

421 Ni opinias ke eblas igi la manifestadon de la vivanta Esperanto pli efika (11).

La intereso por la problemo de interlingvo evidente estas iom kreskanta. Ni atentu la konferencon antaŭ nelonge okazintan en Arnhem pri bilingvismo kaj la ĵus en Avignon finitan kunvenon de iu unuiĝo por la revivigo de la latina lingvo, kiun ĉeestis laŭ gazetaj raportoj 250 sciencistoj el 21 landoj. Ni ne bezonas timi tiujn klopodojn, sed ni povas ekspluati la fakton ke oni pli okupiĝas pri la problemo. Do ni proponas ke ni invitu al certaj gravaj aranĝoj de nia kongreso reprezentantojn de asocioj, kiujn ni volas kaj devas konatigi kun la ebloj de nia lingvo kaj konvinki pri la utilo, eĉ la neeviteblo, de la solvo de la interlingva problemo pere de Esperanto. Ni menciu kiel invitotojn, profesiajn kaj fakajn asociojn de filologoj, interpretistoj, de sciencistoj de diversaj signifaj branĉoj, de la eklezioj, de la junularo, de sportuloj, organizojn de politikistoj, sindikatojn. Ni povus inter ni esperantistoj diskuti pri temoj de speciala intereso por niaj gastoj aŭskultantaj kiel «lingvo kaj politiko», «interlingvo kaj lingvistiko», «literaturo kaj interlingvo» ktp. La gastoj ne bezonas scipovi Esperanton. Certe ili kompren(et)os la plejmulton. Aŭ oni resumas aŭ interpretas. Ni povus enprogramigi specialan aranĝon aŭ plurajn, eble ankaŭ en la kadro de la Somera Universitato. Oni devus atingi ke la aŭskultantoj spertas ke altnivela prelegado kaj diskutado en Esperanto bonege funkcias.

422 Krome ni opinias ke ankaŭ eblas pliintensigi la internan laboron en la esperantistaro (12).

La vivo en niaj lokaj grupoj kaj organizoj estas ofte ne tro vigla. Kulpas ne manko de intereso kaj entuziasmo, kulpas la fakto ke la funkciuloj ofte ege penantaj ne estas sufiĉe helpataj de niaj grandaj organizoj. Ili ne bezonas monon (kvankam ili povus utiligi ankaŭ tiun), ili bezonas instigojn kiel aranĝi grupan vivon. Ni ĉiam sentas ke estus vere necese ke instancoj de la landaj asocioj kaj de UEA okupiĝas pri tiu demando, ke ili komisias lertan kaj taŭgan esperantiston aŭ komisionon kolekti spertojn sur ĉi tiu tereno, peradi la spertojn inter la grupoj, doni instigojn kaj energie serĉi igi la grupan vivon pli interesa kaj alloga. Tia tasko estas vere grava. Se oni sukcesas trovi samideanojn, kiuj estas kapablaj ĉi-rilate, ties laborado povos esti tre utila kaj progresiga.

423 Se oni pligrandigas la amplekson de la kongresa aktivado sur la kampoj 11 kaj 12, oni nepre devas malpligrandigi la specialan laŭstatutan agadon (13). Oni okazigu malpli da kunsidoj aŭ traktu la koncernajn aferojn en antaŭkongreso aŭ antaŭe skribe aŭ iel ajn; vojo estos certe trovebla. Kiel ajn gravaj estu la administraj, formalaj kaj priorganizaj kunsidoj, pli grava kaj sukcesiga estas ĉiam la materia aktivado, la laborado senpere por la ideo mem.»

# VIVANTECO KAJ ESPRIMKAPABLO

## Okaze de «Stafeto»-libro

*Kiel niaj legantoj jam scias, de pluraj numeroj ni aperigas komentojn al STAFETO-libroj. Tiuj komentoj celas evoluigi la ŝaton de la samideanaro al gustumo de bona beletro kaj montri, per spertulaj konstataĵoj, la eĥon, kiun levas niaj junaj talentoj. Nu, jen do unu el la plej penetraj kaj konstrue pripensitaj reagoj antaŭ STAFETO-libro, kiun sendis al Reto Rossetti nia glora veterana verkisto JULIO BAGHY. El la permeso por publikigo, kiun B. adresis al la eldonisto J. Régulo, ni ĉerpas: «Profitante la okazon mi gratulas al vi pro via kuraĝa entrepreno, kiu ebligis ĝis nun la aperon de verkoj bonaj, interesaj kaj tre belaspektaj. La envicigo de junaj talentaj kolegoj en la batalfronton por nia propra kulturo signifas faktan progreson. Ĉiu nova plumlancisto, ĉiu nova verko plifirmigas la vivon de nia lingvo, kiu sen literaturo ja absolute ne plu estus nomebla 'vivanta'. Tiu ĉi literaturo ja kreis propran popolon. Sed, tre kara Samcelano, kun bedaŭro mi konstatas, ke ni, pegazrajdantoj, ofte forgesas pri la nuno, pri la laŭsistema edukado de la legantaro kaj per tio parto de nia verda popolo restas por ĉiam —needukitaj infanoj de la 'rondo familia'.»*

Certe J. B. perdis la saĝon, eble vi pensas nekomprenante la enkondukajn frazojn de la letero, sed ili estas necesaj por prezenti al vi la humoron, kiun mi havis dum kaj post lego de via novelaro *El la maniko.* La libron pruntis al mi lernantino, kiu ricevis ĝin de sia korespondantino Marjorie Boulton. Dirante «mi gratulas vin» absolute ne interpretiĝus la fazoj de tiuj ĉiam kreskantaj entuziasmo, intereso, arta ĝuo, kolega admiro, kiujn mi havis dum la lego, refoliumado de via verko. Por mi kaj certe por nia originala literaturo via novelaro ne estas nur rakontoj de «homo kun vera verkista talento», sed ĝi estas spegulbildo de talento konscia, strebanta krei kaj konservi individuan stilon kaj volanta demonstracii pri interno de homo, inspirita de ideo, celo, kiuj donas plusan enhavon al la spirite arte rakontitaj historietoj. Ĝuste tiu pluso distingas la valoron de via verko el inter la beletristaj skribaĵoj de niaj gekolegoj dum la lastaj jaroj: vi estas ***verkisto esperantista,*** ne sole verkisto rakontanta en Esperanto. Granda diferenco! Pro tio mi estus ĉirkaŭpreminta vin kore varme por montri al vi mian sinceran fratan simpation, mian profundan ĝojon. Pro viaj sprito, ludeme satira infankoreco, kelkfoje farsa mokado vi estus ricevinta kamaradan boksobaton de mi, kiel spontanean akcesoraĵon de la vekita entuziasmo. Certe ilin ambaŭ vi plene meritas; do sentu ilin ricevintaj de via maljuna kolego, amiko!

Cetere estus superflue paroli aparte pri ĉiu novelo, tamen mi ne deziras prisilenti la impresojn, kiujn mi havis. ***Francisko la fuŝulo*** fakte estas majstraĵo, sed ne tiom pro moka ironio, kiom pro la psika kaŭzo, formanta la evoluon ĝis kurioza venĝo. En tiu novelo plej akre evidentiĝas via povo observi ne sole la eksteron, sed ankaŭ sonde penetri en internon nevideblan de homo, sin sentanta esti subpremita de homoj kaj cirkonstancoj. ***La taglibro de Aleksandro Zoffany*** substrekas vian supran kapablon kaj ĝuste tial vi povis tiel arte verki la novelon reala el psikologia vidpunkto. Ĝi tre plaĉis al mi. ***Paŭlo Pease*** estas bonege sukcesinta karakterskizo kaj ĝuste tial ĝi donas plezuron al la leganto. ***La tripieda teruro*** kaj ***La kaprica kadavro*** eminente solvas la prezenton de multaj detektivromanoj en lumgardo de parodiaj satiraĵoj. Akceptu apartan gratulon pro ili. ***Vilaĝa artikisto,*** kvankam ĝi ne povas esti nomebla —novelo, tamen ĝi vekas kaj tenas ĝis la lasta frazo la intereson. ***Vizito de la steloj sur la teron*** trafe simbola felietono. ***La neologismologio*** laŭdas vian spriton, sed ***La Esperanta vortoludo*** fakte, spite al ĝia humora tono, estas rimarkinda disertacio lingvista, montranta vian absolute ne supraĵan studon pri nia lingvo. La neologismo ***kalamburo,*** ŝajnas al mi, estas bonŝance elektita, krome ĝi estas eĉ necesa fakvorto.

Nun pri viaj stilo kaj lingvo mi dezirus surpaperigi kelkajn pensojn, kies mis-

komprenon de via flanko mi timas. Ĝustan komprenon mi intencas veki en vi kaj ne la penson, ke «jen la maljuna urso ree grumblas». Ne temas pri maloftaj vortoj, neologismoj necesaj, ĉar se vi estus absolute evitinta ties uzadon, vi estus devinta neglekti tiun evoluon de nia lingvo, kiun ĝi efektive trairis de komenco ĝis nuno. Temas pri tiu interna batalo —rimarkita de mi dum la legado de via novelaro— pri tiu eble konscia luktado, kiu okazas inter la *humilo* de kreopova talento, aspiranta komprenon, harmonian perfekton kaj *vanto* de verkanto, ne sufiĉe fidanta al esprimpovo de sia propra genio. La *unua* formas sian majstraĵon en harmonia tuto, la *dua* nefidante pri la efiko strebas al stravaganco por pliigi la efikon, por doni nepre «okulfrapan» ornamon al la verko. Rezulto: la leganto ĝuas la harmonian kreaĵon de la talento, admiras la rapidflugan stilon, eĉ kontraŭvole sentas la inspiran sugeston de artisto kaj li ĉagrene *devas* konstati, ke liajn ĝuon, admiron, inspiran kuniĝon kun la artista talento interrompas, ĝenas, eĉ kelkfoje neniigas la vanta strebado al stravaganco, ĉar tiuj «okulfrapaj kaj komprenhaltigaj» ornamoj multfoje, se ne ĉiam, efikas ne kiel beligaj ornamoj, sed kiel embarasaj makuloj. La leganto cerbumas, *kiakaŭze* tia granda, kreopova talento, havanta *«kion diri»* imitas tiujn «instruitajn skribemulojn», kiuj ne-havante «kion diri» kapablas plenigi paĝojn uzante nekutimajn parolturnojn, vortojn nur por nepre alvoki atenton pri siaj sentalente surpaperigitaj fabrikaĵoj. Kiel vi vidas, ĉi tie ne temas ekskluzive pri novaj vortoj, neologismoj, sed temas unue kaj ĉefe pri tio, ke la abundo de tiuj kuriozaĵoj en via novelaro ne estas indaj al via talento, nek al via celkonscio verkista. Refoje kaj tre emfaze mi ripetas, ke via novelaro alportis artan ĝuon, pliigon de mia kolega ĝojo, plifirmiĝon de opinio, ke en la nova generacio de niaj nuntempaj verkistoj vi havas ne sole elstaran lokon, sed havas ankaŭ taskon de gvidanto, kiel verkisto kaj kiel redaktoro, tamen ĝuste pro la menciitaj pensoj, sentoj mi ne povis kontentiĝi per skribo de unufraza poŝtkarto «Mi gratulas al vi pro via libro». Ne kaj ne! Kiu scias, eble vi mem ne rimarkas tiun batalon, kiu ondas inter viaj kreopova talento kaj bagatelema vanto. Reto, kara mia, karega amiko, se promenante en bosko, plena de *marmoraj* statuoj, majstraĵoj de skulptarto, vi subite ekvidus perfektan figuron de Venuso, kies lipojn, ungojn la artisto ŝminke ruĝigis kaj sur kiuj ĉe la kutimaj lokoj li algluis veran hararon, kion *vi* dirus? En Parizo, en la ateliero de iu artisto mi vidis similan al tio. Estis terure! En ĝi reliefiĝis ne la arto, nur la perverso de la artisto, kaj ankoraŭ io: tiu artisto dubis pri la esprimkapablo de la materio, per kiu li kreis fakte artaĵon nediletantan, sed per la aldono de fremda materio por ornami ĝin, por montri ĝin pli viva, li detruis ĝuste tiun vivantecon, tiun perfekton, kiujn montris la vere arte, plastike modlitaj aliaj korpopartoj. Ĉiu artisto devas havi duoblan fidon por ne devii de sia difinita vojo: fidon al sia talento, fidon al la materio. Ĉu Esperanto kun sia deksesmilvorta vortaro ne estas sufiĉe fidinda materio por talento? Ĉu tiu vorttrezoro ŝajnas esti ne sufiĉa, ne esprimpova por verki, por interpreti sentojn, pensojn en arta formo? SE TIEL ESTUS, NI DEVUS REZIGNI PRI LA ORIGINALA CELO DE LA LINGVO INTERNACIA. Oni volis fari Esperanton vivanta lingvo de grizaj milionoj, kulturesprimilo de kaj por la ĉiutagaj homoj kaj ne eksperimenta lingvo de poliglotoj, ne slango de kleruloj de la lingvistiko. La unua havas s o c i a n signifon; la dua degradus nian lingvon — ludilo de tavolinteresoj. Ĉi lastan n e n i u esperantisto volas. Precipe ne la kulturantoj de la lingvo. Inter ili nek vi, nek mi, nek iu ajn el niaj modernaj gekolegoj. Tion mi bone scias. Do la 5 - 6 «novaj» vortoj, netroveblaj en P. V., nek en la aperinta listo ĉe la fino de via libro tute ne ŝokas min (pri ilia neceso mi eĉ ne diskutas, ĉar la signifoj restis kaŝitaj antaŭ mi), tamen ili spontanee vekas penson, se en ĉiu nova verko troviĝos tiom da novaj vortoj, baldaŭ ni havos centojn da tiaj vortoj, kiuj sen difinita senco cirkulos en nia literaturo je granda ĉagreno de legantoj kun penso, ke Esperanto estas mallernebla lingvo. Pri la uzado de maloftaj vortoj, troveblaj en P. V., vi sekvis ĝustan vojon de ilia vivantigo, ĉar ili restantaj nur en la vortaro ŝajnas esti morta materialo. La nekutimaj parolturnoj, verbigo de adjektivaj radikoj apartenas al la natura evoluo kaj ili donas ofte eĉ necesan elastecon, kiun ĉiu vivanta lingvo nepre bezonas.

Jen kion deziris diri al vi maljuna kolego, alte taksanta la valoron de via talento kaj kun granda intereso leganta vian lastan verkon.—*Julio BAGHY.*

# KORAN DANKON!

Revene jam en mia hejmo, post agrabla kaj ege interesa migrado tra la bela Nederlando, ankoraŭ restas freŝa en mia memoro la tuta ĉarmo de tiuj neforgeseblaj tagoj feliĉe pasigitaj, meze de fervoraj kaj simpatiaj gesamideanoj, kiuj senescepte en plej diversaj rondoj, okaze de miaj vizitoj por prelegi pri la hispana folkloro, amike min akceptis, atente min aŭskultis kaj malavare min regalis.

Tial, do, mi volas nun deklari, ke se la materia beleco de la nederlandaj pejzaĝoj logis miajn okulojn kaj liveris inspiron al mia fantazio, la ĝentila gastameco de la nederlandaj esperantistoj lasis tiel profundan impreson en mia koro, ke, laŭlonge de sia pasia senhalta batado —ĝis la lasta tiktako!— ĝi estos arkivo de mia plej alta estimo por la admirinda popolo de la bela Nederlando.

*Luis Hernandez.*

---

**el la paĝo 338**

la plimulto el la membroj estas novaj esperantistoj, frukto de la lastaj kursoj en ĉi tiu urbo kaj inter ili abundas la junuloj. La 8-an de Oktobro oni inaŭguris elementan kurson de Esperanto en la societo «Montepío de la Dependencia Mercantil». Antaŭ multenombra ĉeestantaro, la Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, D-ro Herrero, klarigis la unuan lecionon, post bela parolado en kiu li bonvenigis la novajn lernantojn, kuraĝigante ilin por ke ili sekvu la kurson ĝis la fino kaj rikoltos sukceson. Poste S-ano Vizcaíno sin turnis al la ĉeestantaro kun sia kutima sprito kaj rakontis iun el tiaj amuzaj anekdotoj, per kiuj li ĉiam ĝuigas la esperantistaron. Espereble la nova Esperanto-Grupo de «Educación y Descanso» baldaŭ komencos plenumi la multajn projektojn de sia ampleksa programo. Ke ĝi havu plenan sukceson.—*O. C.*

*BARCELONA.* Oni preparas gravan ekspozicion de tutmondaj elementaj lernolibroj, grafik-historietoj, revuetoj kaj infangazetoj, nacilingve verkitaj, sed pere de Esperanto atingitaj, tre taŭgaj por amuzo de la universala infanaro. Oni petas kunlaboron al ĉi tiu pedagogia tasko, kaj sekve alsendon de ĉiuspeca materialo al jena adreso: Exclusivas Durve, Av. General Mitre 176, Barcelona. Oni rekompencos per simila samvalora literaturaĵo. La ekspozicio estas anoncita por Januaro, 1957.

*LA LAGUNA DE TENERIFE.* La Universitato, kiel pasintjare, organizis instruadon de Esperanto. Okazos du kursoj (por komencantoj kaj progresintoj) kaj la unua leciono estos la 6-an de Novembro.

*SANTA COLOMA DE GRAMANET (Barcelona).* La Esperanta Fako de la C. E. P. en ĉi tiu urbeto, dum ĝiaj grandaj festoj de la 5-a ĝis la 7-a de Septembro, aranĝis esperantistan manifestacion, montranta kolekton da infandesegnaĵoj el dekdu landoj, skulptaĵojn faritajn de infanoj, oleopentraĵojn de nia artisto kaj samideano, S-ro Damián Roig, Esperantajn revuojn, ilustritajn poŝtkartojn, ricevitaj de la membroj de la Esperanta Fako, poŝtmarkojn, afiŝojn el diversaj kongresoj. Montriĝis ankaŭ amaso da Esperantaj libroj (lernolibroj, vortaroj, literaturo ktp.). S-ano Gironés prezentis bustojn de Papo Pio X-a kaj D-ro Zamenhof kaj aliajn verkaĵojn. La membroj de ĉi tiu Fako, sub la entuziasma gvido de ĝia prezidanto prezentis tre bone organizitan ekspozicion, kiu vokis la atenton kaj la laŭdon de la multenombraj vizitantoj.—*A. Martínez.*

**Todo el mundo debe saber dos idiomas: el de su pais y el Esperanto**

# D I V E R S A Ĵ O J

***Ĉiu membro de nia Federacio aŭ abonanto de nia bulteno, sendinta solvon de enigmo, gajnos unu poenton. Gajnintoj de 10 poentoj ricevos libropremion. Ni akceptos solvojn ĝis la 15-a de Decembro.***

Ni ricevis la korektan solvon de la enigmo n.° 40 el jenaj samideanoj: R. Bastardas, Baska Esperanto-Rondo, M. Fernández, J. M. Fontcuberta, A. Núñez, S. Roca Rodó, P. Reyes, V. Monsalve, P. Naranjo, A. Escamilla, E. Padrao kaj V. Hernández. Baska Esperanto-Rondo atingis 10 poentojn, do ni sendas al ĝi la premion.

SOLVO DE LA ENIGMO N.° 40


***Horizontale:*** 2 Murdo. 3 Ade. Pia. 4 Simpl. 5 oneiM. Rusto. 6 Tapioko. 7 Arda. Nubo. 8 Portalo. 9 Brosi. Nesto. 10 Motiv. 11 Pli. Ing. 12 orpuS·

*Vertikale:* 2 odroB. 3 Ajn. Rip. 4 Etapo. 5 Mesia. Osmio. 6 Imperio. 7 Krim. Tipo. 8 Profani. 9 opluK. Levis. 10 Sonos. 11 Ant. Tog. 12 Ombro.

ENIGMO N.° 42

Krucvorta enigmo, de J. Devís.

Malsupra figuro.



***Horizontale:*** 2 (Rad) Malsaniga haladzo. 3 Kolektiva pron. Elemento. 4 Ĉarmegas. 5 Prepozicio. (Rad) Speciala botelo por enteni gasan akvon. 6 (Rad) Aersalto. 7 Skrapu kampon. Kubutosto. 8 Vorto speciala al iu fako. 9 Esti en hela brila stato, produktata de brulanta materialo. Facilmova, sperta. 10 Arĝentoblanka metalo. 11 (Rad) Komercaĵo. (Rad) Rabobirdo, simila je la akcipitro. 12 Metalo, trovata en platinaj minaĵoj.

*Vertikale:* 2 (Rad) Difinita prezaro pri komercaĵoj. 3 Tial ke. (Rad) Purigi per akvo. 4 Malpli larĝa ol ortangulo. 5 Malĝoje premata. Titolo de la idaranoj de Mahometo. 6 (Rad) Kuracilo uzata kontraŭ doloro. 7 (Rad) Ĉiu parto de konko. Intertempe. 8 Digesti. 9 Dia promesita sendato. Malofta gaso, troviĝanta en la aero. 10 (Rad) Verdetflava gaso, malkomponanta akvon. 11 Organa korpo produktata k eligata de la inoj de multaj bestoj. (Rad) Aserto elmetata k defendata de iu persono. 12 Nea nedifina adj.

ENIGMO N.° 43

La rapida hundo, de J. Devís

Al hundo, kiu kapablas atingi senfinan rapidecon, oni ligas al ĝia vosto malgrandan ladujon k piedbatas la beston kiu ekkuras bojveante. Ju pli ĝi aŭdas la metalan bruadon, despli ĝi akcelas sian rapidon. Sed... kiam ĝi haltos?

---

## Desaparece una alta figura esperantista

Después de larga enfermedad, ha fallecido en Graz (Austria) el Dr. Fernando Pawlikowski, obispo de la diócesis mencionada desde hacía 28 años. El finado era un decidido esperantista y muy estimado por todos los habitantes de su diócesis, por su bondad y altas virtudes. En 1952 fué nombrado sin oposición ciudadano de honor de Graz, con motivo de su jubileo episcopal. Su muerte no por esperada deja de ser un aciago golpe para los esperantistas católicos austriacos y una pérdida irreparable para el movimiento esperantista mundial.

## LERNU TRADUKANTE

*Inter la sendintoj de korektaj tradukoj ni distribuos premiojn, laŭ samaj kondiĉoj kiel por la enigmoj.*

Ni ricevis korektajn tradukojn de la tasko de Junio, el jenaj samideanoj: E. E. Yelland, S. Roca Rodó, M. Fernández, R. Albero, E. Pons, V. Monsalve, A. Martínez, A. Núñez, V. H. Llusera, A. Escamilla kaj J. Saladrigas. Atingis 10 poentojn samideanoj A. Núñez, A. Escamilla kaj E. E. Yelland. Ni do sendas al ili la premiojn.

*Ni prezentas unu el la plej korektaj tradukoj:*

La madrida studento, ĉefe tiu veninta el provincoj, alvenis al la kortego kun donjuana spirito, kun la ideo amuziĝi, ludi, persekuti virinojn, intencante, kiel diris la profesoro pri Kemio, kun sia kutima soleno, bruli rapide en medio tro oksigenhava. Escepte de la religia sento, la plejmulto ne havis ĝin, nek ili havis grandajn zorgojn pri ĝi; la studendoj en la lastaj jaroj de la 19-a jarcento venis al la kortego kun la spirito de studento de la 17-a jarcento, kun iluzio imiti, kiel eble, Don-Juanon Tenorio kaj vivi «portante ĝis sango kaj fajro amorojn kaj dueldefiojn». Kvankam li volis vidi la aferojn en la realo kaj intencis akiri klaran ideon pri sia lando kaj pri la rolo, kiun ĝi ludis en la mondo, la kultura studento ne povis. La influo de la eŭropa kulturo al Hispanujo estis reale malgrandigita kaj lokalizita al teknikaj demandoj; la gazetoj havigis ne kompletan ideon pri ĉio; la ĝenerala tendenco estis kredigi, ke la grandaj aferoj de Hispanujo povis esti malgrandaj ekstere de ĝi, kaj kontraŭe, pro speco de internacia malbona fido.

*Jen alia fragmento de la romano «El árbol de la ciencia», de Pío Baroja, kiel nova traduka tasko:*

**Otra vieja rara de la vecindad era la señora Benjamina, a quien daban el mote de Doña Pitusa. Doña Pitusa era una viejezuela pequeña, de nariz corva, ojos muy vivos y boca de sumidero. Solía ir a pedir limosna a la iglesia de Jesús y a la de Montserrat; decía a todas las horas que había tenido muchas desgracias de familia y pérdidas de fortuna; quizá pensaba que esto justificaba su afición al aguardiente. La señora Benjamina recorría medio Madrid pidiendo con distintos pretextos, enviando cartas lacrimosas. Muchas veces, al anochecer, se ponía en una bocacalle, con el velo negro echado sobre la cara, y sorprendía al transeúnte con una narración trágica, expresada en tonos teatrales; decía que era viuda de un general; que acababa de morírsele un hijo de veinte años, el único sostén de su vida; que no tenía para amortajarle ni encender un cirio con que alumbrar su cadáver.**

Okaze de la ĵusa morto de la glora hispana verkisto Pío Baroja, el kies romanoj ni kelkfoje prenas fragmentojn por nia sekcio, ni dediĉas al lia memoro pian respekton.—*Red.*

---

## RADIO ROMA

Esperanto-Fako, Casella Postale 320, Roma, Italujo

Dissendoj en Esperanto
Horo 18,55 ĝis 19,10 (hispana tempo)
Metroj 30,90 - 41,24 - 50,34

NOVEMBRO

2-an - La dua de Novembro.
6-an - Antikvaj monumentoj de Ravenna.
7-an - Mondo esperantista.
9-an - Italaj komponistoj: Bellini.
13-an - La «Thermae de Caracalla» en Romo.
14-an - Novaĵoj el Italujo.
16-an - «Sinjoro Tadeo» de Adam Mickiewicz.
20-an - Pierluigi de Palestrina.
21-an - Nia Gazeto.
23-an - Leterkesto kaj bibliografio.
27-an - Italaj belartaj urboj: Venecio.
28-an - Tri gemoj de la Tireno.
30-an - Italaj abatejoj: Montecassino.

## VIVO SAMIDEANA

Nia bona amiko kaj aktiva esperantisto de Zaragozo, S-ano Antonio Marco Botella edziĝis la 18-an de Oktobro kun F-ino María del Pilar Gayarre Villoria. Al la feliĉa paro ni sendas nian plej koran gratulon.


## VOCABULARIO ESPAÑOL - ESPERANTO

del Doctor E. Tudela Flores

22.000 palabras

Precio: 65 pesetas

LIBROSERVO DE HISPANA ESPERANTO - FEDERACIO

Pelayo 7 — Valencia

*Del éxito de venta de este vocabulario depende la pronta edición del Esperanto-Español, actualmente en preparación.*

## LA MALPRUDENTA SCIVOLULO

interesa novelo de Cervantes en klara, bela kaj fidela traduko de

**LUIS HERNANDEZ**

68 paĝoj 20 x 14 cm. Belaj ilustroj kaj vinjetoj. Arta kvinkolora surkovrilo. **20 pesetoj.**

Libro-Servo de Hispana Esperanto-Federacio

*Pronto se pondrá a la venta*

## LERNOLIBRO DE ESPERANTO

**de L. Mimó**

«...una gramática moderna de Esperanto, completa y pedagógica. Los maestros y alumnos de habla castellana tendrán en él un buen libro de aclaraciones y prácticas de la lengua internacional. Realmente, no es un «lernolibro» más, sino uno excepcional».

*D. Dalmau*

**(Miembro de la Academia de Esperanto)**


● Gesinjoroj Hibon-García, kiuj geedziĝis dum la pasinta kongreso en Barcelono, dankas kore ĉiujn, kiuj gratulis ilin kaj ĉeestis la ceremonion.

● S-ro Evzen Veverka, Miletín 250, u Horic v Podkrk, Ĉeĥoslovakio, deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn filatele afrankitajn, alumetetiketojn kaj poŝtmarkojn, kun gesamideanoj el la tuta mondo.

● Hispano deziras korespondi kun tutmondaj gesamideanoj en esperanto. Skribu al: S-ro Rafael Granados Gutiérrez, str. Sevilla 6, La Línea de la Concepción, Cádiz, Hispanujo.

● Al ĉiu. kiu sendos al mi bele afrankitan poŝtkarton, mi respondos same. Mi certe respondos! Ladislav Ŝebestík, str. Jehnice 101, Brno 21, Ĉeĥoslovakio.

● Deziras korespondi kun hispanaj gesamideanoj S-ro Nikola J. Kolorov, str. Firnovo 21, Kozonlik, Bulgario.

● Instruist-edukistino deziras korespondi kun esperantisto samprofesia. Adreso: Milena Ŝkodová, Sedlec 14, Praha 6, Ĉeĥoslovakio.


BOLETIN

de la

FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

BULTENO

DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Adreso de la Redakcio kaj Federacio

Str. Pelayo, 7, 1.ª

VALENCIA


## Al la Hispana Esperantistaro

El koro de griza, aŭtuna Milano,
Korege salutas vin samideano,
Pri via ĉielo kaj maro revanta,
Amikan, tutkoran saluton sendanta.
Amikojn mi havas, fervoran areton,
En tuta la mondo tre viglan rondeton;
Sed, tamen, malĝojon en koro mi sentas,
En ĝi io mankas: España silentas.
Pro tio mi skribas, al vi konfidante,
Hispanan amikon kun ĝoj' atendante.

L'adreson ĉi-suban vi donos al li,
Plej karan nun dankon akceptu de mi.

(Mi estas studento 18 jara, kaj mi havas duagradan ateston prí Esperanto).

Skribu al: S-ro Aŭgusto Balossino, Via Costanza 22, Milano, Italujo.


PERIS-G. VÍA M. TURIA, 28-VALENCIA

# Contribución pro Ayuda Económica a la :: Federación Española de Esperanto ::

Según se puso de manifiesto en el Congreso de Barcelona (léase «Boletín», núm. 92-93, de Agosto-Septiembre, página 314), para continuar la buena marcha de la Federación, es necesario incrementar sus fondos. Como los ingresos actuales solo bastan para cubrir los gastos del boletín y ordinarios, las doce mil pesetas anuales —previstas para la retribución de un funcionario de la Federación— hay que obtenerlas por otros medios, hasta que el aumento del número de socios haga factible que sean cubiertas por las cuotas ordinarias.

Después de un meditado estudio al respecto, toda vez que el aumento de la cuota de socio con carácter general no puede hacerse, vista la experiencia de los anteriores aumentos, esta Junta Directiva ha estimado como más práctico el siguiente método:

Se necesita encontrar 50 personas, dispuestas a contribuir mensualmente con la cantidad de 25 pesetas cada una, para el fondo «Pro Ayuda Económica». De esta forma se obtendrán 1.250 pesetas al mes. Las necesarias son solamente 1.000; pero se ha hecho así para estimular a los interesados con un «premio de consolación». A cada contribuyente se le asignarán dos «números de consolación» (01 y 51, 02 y 52, 03 y 53.... 49 y 99, 50 y 00), y cada mes, la persona que tenga asignado el número coincidente con las dos últimas cifras del primer premio de la Lotería Nacional del día 25, percibirá un premio de 250 pesetas en efectivo o en un lote de libros por el mismo valor.

Los Grupos pueden suscribir tantas aportaciones de 25 pesetas como permitan sus ingresos pro ayuda Federación. Los socios individuales pueden suscribir una o tantas aportaciones como deseen. Y también, en vez de una aportación anual (300 pesetas), solamente cuatrimestral (100 pesetas), cuyo puesto libre en los restantes meses del año —a efectos de los «número de consolación»— será continuado por otro contribuyente del mismo tipo cuatrimestral.

Para poner en práctica esta solución, esperamos recibir cumplimentado el boletín que figura al pié.

Confiamos en que todos nuestros consocios, cuyas posibilidades se lo permitan, desearán contribuir a esta Ayuda a la Federación.

*LA JUNTA DIRECTIVA*